„КОВНО-ЭСПЕРАНТО“ ★★★ „KOVNO-ESPERANTO“

Журналъ Ковенскаго Общества Эсперантистовъ

★★★

Подписная цѣна: за годъ—1 руб., за 6 мѣс.—60 коп. Пожизненные и дѣйств. члены К.О.Э. получаютъ въ Ковнѣ журналъ безплатно. За перес. по почтѣ особо уплач.: за годъ—60 к. и за 6 мѣс.—30 к.

Адресъ редакціи: Ковна, Б.-Садовая, д. Рацъ

★★★

Цѣна отд. №—3 коп., въ пров. и съ перес. 5 к.

★★★



№ 7 (21)

1913.

10 Мая

23 Majo

Presorgano de Kovna Esperantista Societo

★★★

Abonprezo: Jare—1 sm., duonjare—60 sd. Dumvivaj kaj efektivaj membroj de K.E.S. ricevas la ĵurnalon en Kovno senpage. La poŝtelspezoj—60 sd. p. jaro, 30 sd. p. duonjaro.

Adreso de Redakcio: RUSLANDO. KOVNA Esperantista Societo.

★★★

Unu ekz.—3 sd., en provincoj—5 sd., eksterlande—7 sd.

★★★

Отъ 10 до 30 №№ въ годъ. ★ Dum la jaro 10—30 numerojn.

Текущій счетъ въ Ковенск. Отдѣл. Соед. Банка (№ 916) и въ Esperantista Ĉekbanko

Ковна 10 Мая.

Эсперантское движеніе, по нашему мнѣнію, переживаетъ серьезный кризисъ, вѣрнѣе переходный періодъ. Закончился первый 25-ти лѣтній періодъ частной созидательной работы, въ теченіе котораго языкъ достигъ полнаго своего развитія, наравнѣ съ прочими живыми языками; создалась обширная и разносторонняя литература по всѣмъ отраслямъ знаній; идея международнаго языка, воплотившагося въ языкѣ „эсперанто“, проникла во всѣ уголки земного шара: словомъ, самоотверженными и талантливыми трудами первыхъ эсперантистовъ вполнѣ подготовлена почва для всесторонняго примѣненія эсперанто въ практической жизни, въ области международныхъ сношеній, и теперь... остается-или ожидать сильной рѣшительной инициативы, или постепенно, шагъ за шагомъ завоевывать для эсперанто новыя позиціи, новыя области примѣненія. Трудно сказать, сколько лѣтъ продолжится этотъ переходный пе-

Kovno 23 Majo.

La esperanta movado, laŭ nia opinio, travivas seriozan krizon, aŭ pli ĝuste—transirantan periodon. Finiĝis unua 25-jara periodo de la privata kreema periodo, dum kiu nia lingvo atingis sian plenan disvolvon tute egale, kiel ĉiuj vivantaj lingvoj; kreiĝis riĉa kaj diversspeca literaturo en ĉiuj branĉoj de la scienco; la ideo de la lingvo internacia, konkresigita en lingvo „esperanto“ enpenetriĝis en ĉiuj anguletoj de l'universo: unuvorte, per la sindonemaj kaj talentaj laboroj de la unuaj esperantistoj estas plene preparita la tero por ĉiuflanka aplikado de esperanto en praktika vivo, en la sfero de internaciaj rilatoj, kaj nun—aŭ oni devas atendi-fortan decidplenan iniciativon, aŭ laŭgrade, paŝo post paŝo, almiliti por esperanto novajn poziciojn, novajn sferojn de ĝia aplikado. Estas malfacile antaŭdiri kiel longe povas

ріодъ, но, если онъ пойдетъ по второму намѣченному пути, то сократить его-зависитъ въ значительной степени отъ нашихъ трудовъ и отъ нашей энергіи.

daŭri tiu ĉi transiranta periodo, tamen, se ĝi iros laŭ dua montrita vojo, tiam ĝin mallongigi plejmulte dependas de niaj laboroj, de nia energio.

Хроника Общества

Kroniko de Kovna Esperantista Societo (Ruslando).

● La 5-an de Aprilo okazis jarkunveno de K. E. S. Kiel prezidanto de tiu ĉi kunveno estis elektita Urbesro s-ro A. Brjozovski.

F-ino N. A. Nedoŝivin tralegis la raporton de A. M. Nedoŝivin (kiu malestis pro malsano) pri „Solidareco inter la Esperantistoj“.

P. D. Medem raportis pri planoj de estonta agado de nia Societo kaj pri aranĝo de Tutruslanda Esperanta Eldonado.

M. S. Valentinov donis sciigojn pri lastaj novaĵoj de esperanta movado.

Financa raporto por jaro 1912— estis aprobita.

Por donaco al nia Societo de 287 diversaj libroj la ĝenerala kunveno unuvoĉe elektis s-ron G. K. Davidov, en dumvivaj membroj de K. E. S.

Por multvaloraj meritoj de Honora membro s-ro A. M. Nedoŝivin oni decidis pendigi en Societejo lian potreton. Decido estis akceptita kun unuanimaj aplaŭdoj.

Dum kunveno estis disdonata al ĉiuj ĉeestantoj presita raporto pri K. E. S. kun la suprenomuta raporto de A. M. Nedoŝivin.

● Lastatempe, Krom 62 esperantaj ĵurnaloj (vidu №№ 4, 5 kaj 6), ni ricevis la sekvantajn:

63. Antaŭen Esperantistoj (Америка).
64. Finna Esperantisto.
65. La Du Steloj kaj Esperanta Penso (Америка).
66. Bulteno de Barcelona Stelo.
67. Sarta Stelo.
68. Bulteno de Pola Piotrokova. Societo (Rusujo).
69 La Internacia Abstinenta Observanto.

Изъ міра эсперантистовъ.

— *Венгрія* Издатель журнала „La Verda Standarto“ s-ro Egri Nyomda выдалъ 20.000 кронъ на пропаганду „Эсперанто“.

— *Египетъ*. Въ строющемся здѣсь международномъ лѣчебномъ институтѣ (санаторіи для туберкулезныхъ и пр.) оффиціальнымъ языкомъ будетъ служить Эсперанто.

— *Испанія*. Въ г. Arboledo улица Cuchilleria переименована въ улицу Д-ра Заменгофа.

— *Орелъ*. Во время пасхальной заутрени въ одной изъ приходскихъ церквей Св. Евангеліе читалось между прочимъ и на эсперантскомъ языкѣ („Волна Эсперанто“ № 5).

— *Америка*. Въ Ньюкестлѣ (Ohio) и Такомѣ (Wanh) Эсперанто введено въ высшихъ учебныхъ заведеніяхъ.

— Въ *Гонолулу* открыто новое общество.

— *Испанія*. Въ г. Севиллѣ мѣстному Эсперантскому Обществу выдана субсидія въ 1500 пезетъ.

— *Петровскъ—портъ*. Эсперанто преподается въ мужской гимназіи.

— *Ревель*. Была поставлена эсперантская пьеса „Tie ĉi oni parolas esperante“.

— *Москва.* Разыграны три пьесы: „Konvenaĵoj“, „Silento“ и „Mi mortis“.

— *Ростовъ на Дону.* Эсперанто введено въ Коммерческомъ училищѣ.


— *Италія.* Новыя группы въ Vicenze, Rovereto, Cittadella и др.

— *Богемія.* Administacio de kuracurbo Francensbad donas al ĉiuj Esperantistoj rabaton ĝis 50% je la uzado de siaj banoj kaj kuraciloj. Tiu ĉi urbo eldonis belan ilustritan gvidlibron, kiun ĉiu Esperantisto povas senpage ricevi.

Bankuracisto D-ro Maurus Fisch ankaŭ volonte konsentis fari al la Esperantistoj rabaton de 20% je la kuracado en sia diete-fizika pensiono, laŭ tre modera tarifo.


— *Германія.* En Stuttgart dum la Oka Germana Kongreso Esp-ta okazos propaganda Ekspozicio.

Ĉiu samideano sendu bele ilustritan poŝtkarton (marko bildflanke) al Oskar Ziegler, Heusteigstr. 56 III. en Stuttgart (Germanujo) por Ekspozicio· *Li respondos per esp. poŝtk. de Stuttgart.*



Alvoko.

S-ro O. Van Schoor el Antverpen deziras reorganizi internacian unuiĝon de esperantistoj-farmaciistoj kaj li petas komuniki al li adresojn de la rusaj farmaciistoj-esperantistoj. Tial oni petas ĉiujn gekolegojn tuj komuniki sian adreson al s-ro Anatolo Grinberg 39, Puŝkinskaja str. Kiev (Rusujo).



Naŭa Universala Kongreso de Esperanto en Berno (Svislando).

24—31 DE AŬGUSTO 1913 (по нов. ст.)

La tempo rapidas! Nur tri monatojn ankoraŭ kaj nia granda festo komenciĝos. Grava kaj peza estas la laboro de la Organiza Komitato, kaj la kongresanoj plejeble komplikigas tiun laboron prokrastante sian aliĝon ĝis la lasta momento.

En nia lasta kunsido ni statigis la programon de la kongreso. Laŭ tiu programo la solena malferma kunsido de la Naŭa okazos la 24-an de Aŭgusto (dimanĉo) je la tria posttagmeze;la solena malferma kunsido de UEA lundon 25-an de Aŭgusto posttagmeze. Ĉiutage, escepte merkrede, okazos la laboraj kunsidoj de la Naŭa kaj de UEA. La Solena ferma kunsido de la Naŭa okazos sabaton posttagmeze. Ĉiumatene inter la 8-a kaj la 10-a, kaj ĉiuvespere post la 5-a kunvenados la diversaj fakaj societoj. La komitatoj de ĉi tiuj societoj bonvolu senprokraste komuniki al ni kiom da kunsidoj ili deziras, por ke ni povu starigi horaron.

La 24-an de Aŭgusto estos diservoj en protestania, katolika kaj hebrea preĝejoj. Merkrede estos aranĝata belega tuttaga ekskurso al Berna Alparo. La kongresanoj troviĝos meze de la neĝa montaro kaj ĝuados nekompareblan pejzaĝon. La internacia balo, en mirinde bela salonego de la Nova Kazino okazos ĵaŭdon vespere. Ne forgesu alporti viajn naciajn kostumojn!

Kiel teatraĵon oni ludos la originalan svisan dramon „La Patreco“, verkitan de samideanino M. Wolf en Chaux-de-Fonds.

Plej bela festo de la tuta kongreso kunvenigos la Esperantistaron la 31-an de Aŭgusto sur Gurten, monto 860 metrojn alta proksime de Bern, kun elektra fervojo: Matene prezentado de la Ruĝa Kruco, poste festeno en ombra parko. Posttagmeze granda svispopulara festo kun „jodlada“ koncerto, luktado k. t. p.

Ĉiuvespere dum la kongresa semajno estos belaj koncertoj, paroladoj kun lumbildoj, promenadoj ĉirkaŭ la urbo, boatveturoj sur Aare k. t. p.

La Kongresa Libro estos tre riĉenhava kaj servos kiel taŭga kaj fidinda gvidlibro. En ĝi oni trovos la liston de ĉiuj kongresanoj, kiuj pagis sian kotizon antaŭ la fino de junio. Kiu do volas esti en tiu listo ne plu prokrastu la aliĝon. La kongresa karto kostas 6 Spesmilojn (15 frankojn), la help-kongresa karto 3 Sm. La oficialaj poŝtkartoj estas tre volonte aĉetataj (10 centimoj po peco) kaj la unua provizo da sigelmarkoj baldaŭ estos elĉerpita (100 pecoj=0,40 Sm.).

Esperantistoj, sendante vian aliĝon, ne forgesu la adresojn de nia Komitato: Mono estu sendata al „Kantonalbank en Bern“, kaj ĉia korespondaĵo al la Universala Kongreso de Esperanto en Berno.

Berno, en Majo 1913.

La Direktanta Komitato.

Klarigoj.

Suplementaj Kartoj. Familianoj (edzino kaj infanoj) kune venantaj kun la familiestro pagas nur po Sm. 3.—, kaj ricevas **suplementan kongreskarton**, kiu ne rajtigas al senpaga ricevo de la kongresaj dokumentoj.

Loĝado kaj manĝado. Oni estas insiste petata senprokraste rezervigi siajn ĉambrojn.

Tarifo por ĉambro, por sep tagoj:

	kun matenmanĝo	kun tri manĝoj.
1a klaso maksimume	Sm. 23.—	Sm. 34.—
2e „ „	„ 17.—	„ 28.—
3a „ „	„ 12.—	„ 20.—
4a „ „	„ 10.—	„ 17.—

La eventuale troa mono sendita (ekzemple de la kongresanoj, kiuj restos en Bern malpli ol 7 tagojn, aŭ al kiuj la komitato sukcesos havigi ĉambron je pli malalta prezo ol montrita supre) estos repagata de la kongresa kaso dum la kongreso.

Aranĝo kun U. E. A. Sekve de aranĝo kun U. E. A. ĉiu membro de la Naŭa Universala Kongreto de Esperano rajtas ĉeesti la kunvenojn de la Kongreso de U. E. A., kiu okazos samtempe kun la internacia, kaj ricevi senpage la oficialajn dokumentojn de la kongreso de U. E. A.

La Organiza Komitato:
J. Schmid.
R. de Saussure.
Ed. Stettler.
Do. Th. Christen.
Charlotte Pulvers.

БИБЛІОГРАФИЧЕСКІЙ ЛИСТОКЪ.

Bibliografio.

La Verkistojn, kiuj deziras, ke „K. E.“ raportu pri iliaj eldonaĵoj, ni petas sendi al la Redakcio po du ekzempleroj de ĉiu verko.

— Г. К. Давыдовымъ изданъ списокъ учебниковъ эсперантскаго языка для русскихъ. По списку видно, что до 1913 г. появилось въ свѣтъ болѣе 100 русскихъ учебниковъ.

INTERNACIA SCIENCA ASOCIO ESPERANTISTA.

Teknika Sekcio.

Fondiĝis Teknika Sekcio, kies sekretario estas S-ro D-ro Alfredo Stromboli, Via Grovallo, 3, Genova (Italujo). La sekcio celas unuigi la teknikistojn de ĉiuj nacioj por diskonigi kiel eble plej rapide per la lingvo internacia Esperanto ĉiun progreson kaj aplikadon en la kampo de la inĝenierarto kaj tekniko. Por aliĝi al tiu sekcio, oni devas esti membro de la Internacia Scienca Asocio Esp., t. e., pagi kotizon de dek frankoj por ricevi la oficialan gazeton *Scienca Cazeto*, kiu estas ankaŭ la organo de la Teknika Sekcio. Laŭvolaj donacoj por la teknika Sekcio estas dankeme

ricevotaj. Jom post iom la Teknika Sekcio okupos sin per la tradukado de gravaj teknikaj verkoj, resumoj de plej gravaj artikoloj en teknikaj gazetoj de iu ajn nacio, organizo de fakaj kongresoj k. t. p. En ĉiu grava urbo ni starigos delegiton, kiu plenumos la taskon informi kaj helpi la membrojn de la Asocio.

Ni petas, ke ili sciigu per naciaj teknikaj gazetoj la fondiĝon de nia Sekcio donante ĝian adreson por doni informojn k. t. p.



HUMORAĴOJ.

Kial ne?—Dekjara knabeto gratulas sian avinon je ŝia naskjĝotago.

— Avino, li diris, mi deziras, ke vi restu viva ĝis la fino de viaj tagoj.

— Ho, kara Peĉjo, mi certe ne vivos tiel longe.

(El Germana Esp.).

Trafa respondo.—Ludoviko manĝas pomon.

Lia patro demandas:—ĉu vi petis permeson de via patrino por manĝi la pomon?

— Jes, paĉjo, mi petis.

— Ne mensogu, alie mi punos vin; diru vere: ĉu vi petis permeson?

— Jes, mi certigas vin: (paŭzeto) ŝi diris, ke mi ne devus ĝin manĝi.

(El Portugala Revuo).

Plej bona argumento. Usonano: En mia lando la riveroj estas tiel larĝaj, ke oni eĉ per lorno ne povas vidi la alian bordon...

Irlandano: Nu, miru pri tio, en mia lando ili estas tiel mallarĝaj, ke ili havas nur unu bordon.

(El Finna Esp.)-

— Vi, certe, konas „Sevilan Barbiron“?

Ne, mi ĉiam razas min mem.

(El Pola Esp.)



Estimata Samideanaro!

Ni intencas ree eldonadi **Tutmondan Adresaron Esperantistan** kaj senpage dissendadi ĝin al ĉiuj enskribiĝontoj. Ni enskribos plenan nomon de esperantisto, lian aĝon, profesion kaj adreson. Estas dezirindaj, sed nedevigaj, ankaŭ respondoj je la demandoj: kiam Vi esperantistiĝis kaj ĉu Vi apartenas al ia esperantista grupo, societo aŭ klubo. Se iu interŝanĝas ion, notu ĉi-tion. La sciigojn sendu al ni en fermita letero, aldonante la internacian respondkuponon aŭ 10-kopekan rusan poŝmarkon. Por tiu respondkupono ni enpresos Vian nomon kaj transsendos al vi tuj post apero volumeton, enhavantan Vian adreson. Ĉiu volumeto enhavos po 1000 adresoj.

Samideaninoj kaj Samideanoj! Pripensu la gravecon de la tutmonda enketo kuj tuj sendu al ni la necesajn informojn.

Altestime

C. Polak, delegito de U. E. A.

G. Javorskij, sekrstario de Kiev. Esper. Societo

Sendaĵojn oni adresu al Georgo Javorskij, Annenkovskaja, 28, Kiew (Rusl).

Издатель *Ковенское Общество Эсперантистовъ.*

Редакторъ *М. С. Валентиновъ.*

„Тов. Тип. М. Соколовскаго“ въ Ковнѣ